


KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS

Komentoj pri la
Manifesto de la movado
por la internacia lingvo
Esperanto

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



KIO NI ESTAS

KAJ

KION NI CELAS

**Komentoj pri la
Manifesto de la movado
por la internacia lingvo
Esperanto**

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Rotterdam 1999**

Enhavo

Enkonduko	3
1. Demokrateco	4
2. Transnacia edukado	7
3. Pedagogia efikeco	10
4. Plurlingveco	13
5. Lingvaj rajtoj	16
6. Lingva diverseco	19
7. Homa emancipiĝo	22
Por plua legado	24

ISBN 92 9017 061 1

© Universala Esperanto-Asocio, 1999

Redaktita de Renato Corsetti kaj Osmo Buller

Grafike aranĝita de Francisco L. Veuthey

Presita de Stichting Argus, Rotterdam

Enkonduko

**Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto,
direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo,
deklaras nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj
invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.**

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

EN LA 81-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en Prago en 1996 estis lanĉita la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto, pli fama kiel Manifesto de Prago. Ĝi prezentas koncize kaj dinamike, eĉ bataleme, la ĉefajn celojn, por kiuj ni aktivis. Ĝi direktas sin eksteren: al politikistoj, ĵurnalistoj, internaciaj organizaĵoj kaj instancoj, kaj al ĉiuj "homoj de bona volo".

En Prago 700 kongresanoj aliĝis al la Manifesto per sia subskribo. La tiama nomkolektado estis iom hasta kaj spontanea, kaj multaj maltrafis la okazon. Sekve oni daŭrigis ĝin post la UK — kaj ĝi fariĝis la plej granda referendumo en la Esperanto-komunumo: fine de 1998 sub la Manifesto staris 12 500 nomoj.

La celo de la kolektado ne estis imponi nombre, sed konigi la Manifeston inter esperantistoj mem. Efektive, en plej diversaj Esperanto-aranĝoj tra la mondo, en kluboj kaj en kursoj oni prelegis kaj diskutis pri ĝi. Tiel disvolviĝis eduka projekto, kiu brile kontribuas al la celo de Kampanjo 2000 plialtigi la idean nivelon de nia movado.

Por ke tiu projekto daŭru kaj kresku, ni proponas jenajn artikolojn, kiuj pli funde prilumas la Manifestan septezon. Mi esperas, ke ili instigos pluajn diskutojn en grupoj kaj gazetoj, kaj ke ankaŭ individua leganto profitos de ili.




Osmo Buller

1 Demokratio

Komunika sistemo kiu tutvive privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

FRANK STOCKER
Politik-sciencisto



DEMOKRATIO: verŝajne ne ekzistas alia nocio, kiu trovas tiel senliman subtenon kiel tiu ĉi. Ĉu nuntempe imageblas homo, kiu nomas sin mem “nedemokrato” aŭ “kontraŭdemokrato”? Demokratio agnoskas, ke homoj estas denaske liberaj. Demokratio jure garantias, ke ĉiu homo povas praktiki siajn rajtojn kadre de konstitucio kaj leĝoj. Demokratio devas helpi, por ke ĉiu homo ankaŭ havu la socian bazon por praktikado de siaj rajtoj. Tio estas la plej profunda signifo de demokratio.

Kion tio signifas por lingva politiko?

Demokrato agnoskas, ke ĉiu homo rajtas paroli kiel ajn li volas: ĉu dialekte, ĉu fremdlingve, ĉu laŭ la literatura maniero, ĉu balbute, ĉu laŭte, ĉu longe, ĉu laŭ mem inventita maniero. Estas la afero de ĉiu homo mem, kiun lingvon li uzas.

Artikolo 2, alineo 1, de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro 1948 tekstas: “*Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.*”

Tiun tekston akceptis ĉiuj membroj de UN. Laŭsignife la saman enhavon havas ankaŭ la Eŭropa Konvencio por la Protektado de Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj de la 4-a de novembro 1950 (art. 14) kaj la Internacia Interligo pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj de la 16-a de decembro 1966 (art. 2).

Tiel la subskribintoj akceptis, ke neniu devas esti diskriminaciata pro uzado de iu specifa lingvo. Se vi volas, vi povas paroli iun ajn lingvon — la Deklaracio donas al vi la garantion, ke neniu punos vin pro tio. Sed: la Deklaracio neniel donas garantion, ke unuopulo aŭ pli grandaj grupoj, nome lingvaj malplimulto, atingos siajn celojn per tiu lingvo! La artikolo nur postulas, ke neniu estu diskriminaciata pro sia lingvo, ke ĉiu estu egale traktata. Sed se vi lingve ne estas

egala al la aliaj, se vi ne povas gajni antaŭ tribunalo, ĉar vi ne parolas la tribunalan lingvon — tio estas via problemo. Vi ja tamen havas la egalajn rajtojn.

Sed demokratio ja bezonas ne nur egalecon. Ĝi estas iom pli. Demokratio postulas la aktivan subtenon de egaleco. Kaj tion jam rimarkis ankaŭ la ŝtatestroj. Pro tio en la Internacia Interligo pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj de la 16-a de decembro 1966 unuafoje aperas la specialaj rajtoj por malplimultoj. Ili devas havi interalie la rajton flegi siajn kulturon kaj lingvon.

Tute novan epokon komencis tamen nur la Dokumento de la Kopenhaga renkontiĝo de la Konferenco pri la Homaj Dimensioj* de KSKE (Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) de la 29-a de junio 1990. En ĝi unuafoje estas eksplicite formulitaj precizaj postuloj pri aktiva, subtena politiko favore al malplimultoj. En ĝi aperas interalie la frazo ke la *“partoprenantaj ŝtatoj strebos [...] garantii, kie tio eblas kaj necesas, la uzadon de la gepatra lingvo en la oficejoj.”*

*homaj dimensioj: kadra termino de KSKE por homaj rajtoj kaj sociala bonfarto

“Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo...”



Kompreneble la formulo “kie tio eblas kaj necesas” estas iom vasta. Tiamaniere oni volis eviti, ke ekzemple enmigrintoj povu postuli ke oni uzu ilian lingvon ĉe la administrado de la nova hejmlando. Sed krom tiu ioma limigo la artikolo donas tute klaran gvidlinion: demokrata principo postulas, ke ĉiu ano de malplimulto havu la rajton uzi sian gepatran lingvon ĉe la administrantoj.

En okcidenta Eŭropo momente kreiĝas nova ŝtato, kiu estas vera defio al la demokrata principo en lingvopolitiko. Temas pri Eŭropa Unio. Ĉu eblas en EU reteni la demokratian principon, ke ĉiu rajtas uzi sian gepatran lingvon? Kompreneble ĉiu el la 11 naciaj lingvoj estas jure samranga ene de EU. Jure regas absoluta egaleco. Sed kio pri la frateco, kio pri la aktiva subteno por realigo de la fakta egaleco?



*“Por ke lingvo estu
tutmonda, ne sufiĉas
nomi ĝin tia.”*

Frapfrazo de la Unua Libro, 1887

Multo jam nun indikas, ke tiurilate la afero fiaskos. Ene de la administradaj instancoj de EU regas preskaŭ senescepte la franca kaj la angla. Kiu volas havi bone pagatan laboron ĉe EU aŭ bone pagatan mendon por sia entrepreno, nepre devas uzi unu el la du lingvoj. Kiu volas stipendion por la universitata kariero, petu ĝin en la angla. Kaj tiel plu. La respondeculoj de EU defendas sin atentigante pri la Traktato, kiu garantias egalajn rajtojn. Kaj tiu argumento eĉ estas prava. Pro tio multaj jam silentas post tiu argumento. Sed la grava afero estas, ke demokratio postulas ne nur juran egalecon, sed same aktivan strebon al la fakta egaleco.

Kaj jen estas la granda manko en la lingva politiko de EU.

Kiel ni vidas, la sistemoj ĉi-supre priskribitaj, malgraŭ la bonaj intencoj, ankoraŭ *“privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo”*. Ili, do, *“estas fundamente maldemokratiaj”*.

Evidente nur sistemo kiu baziĝas sur sama kvanto da peno por atingi saman komunik-kapablon, povas garantii demokration. Tiu sistemo povas esti starigata nur surbaze de neŭtrala lingvo, kiu ne estante la lingvo de unu el la komunikantaj grupoj, metas ĉiujn en la samajn kondiĉojn.

Esperanto estas ĝuste tio.

*“Ni faras komprenon
inter popoloj!”* –
glumarko de
Germana Esperanto-
Junularo laŭ dezajno
de Tania Berger.



2 Transnacia edukado

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difnita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difnita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

PENSU PRI LA INSTRUADO kiun vi ricevis pri la mondo en via elementa lernejo kaj poste. Rigardu la edukadon kiun ricevas nun viaj infanoj kaj la infanoj de viaj najbaroj. En la lastaj jardekoj, konscio pri la interdependeco de la mondaj nacioj vastiĝis ĝis preskaŭ universala akceptiĝo. Naskiĝis Eŭropa Unio, funkciadas Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj politikaj, humanismaj kaj komercaj entreprenoj sur plej diversaj kampoj, kaj vojaĝantoj ĉiam pli senĝene konatiĝas kun la plej foraj partoj de sia tergloba hejmo. Sed kiom progresis la preparado de niaj infanoj por la eĉ pli senlima mondo kiun ili spertos en la tria jarmilo?

Mi ankoraŭ memoras iom de la enhavo de la lecionoj en miaj britaj lernejoj. La valoroj de la brita kulturo estis la normala realaĵo: ĉio alia estis stranga, fremda, eventuale interesa sed certe ne nia. Ni lernis pri niaj graflandoj kaj ĉefurboj, kaj pri la teritorioj de la perdiĝanta komunumo de eks-kolonioj. Pri la politika sistemo de la brita parlamento ni devis montri nin detale informitaj. La historion de ĉiuj invadintoj de nia teritorio ni bone lernis, kun la longa listo de reĝoj kaj reĝinoj kaj aliaj elstaraj (plejofte politikaj) personecoj. Pri eksterlanda historio ni informiĝis nur poste, laŭ la rilatoj de nia lando kun la ekstera mondo: pri la eks-kolonioj, inkluzive Usonon, kies loĝantoj maldankeme kaj malĝentile ribelis montrante sian necivilizan karakteron, kaj pri la geografie apuda Eŭropo, kies loĝantoj ne ĉiam kondukis laŭ la normoj karakterizantaj civilizan demokratecon. Kiam mi kaj miaj kun-klasanoj fine eklernis la francan lingvon, ni sekvis longan tradicion, kiu daŭras ĝis hodiaŭ; temas pri tradicio bazita sur kriterioj de kultura kaj diplomacia historio kaj geografia proksimeco sed ne ĉiam sur reciproka respekto.

Mi fariĝis patro de du usonaj filinoj. En sia lernejo ili konatiĝis kun usonaj ŝtatoj, prezidantoj, pravigoj de fiera sendependiĝo disde la iamaj britaj koloniaj mastroj. Mi rimarkis ke pli ol 95% de la enhavo de iliaj lecionoj estas malsama je tio, kion mi spertis. Mi iam faris simplan demandon al lernej-

DUNCAN CHARTERS

Profesoro pri fremdaj lingvoj



*Sur la infanajn cerbojn presas
mispensojn la edukistemo
kaj tiu infanaĝa premo
por naciismo ilin dresas.*

*La fieduko tre sukcesas –
ĝangale kreskas tiu semo;
sur la infanajn cerbojn presas
mispensojn la edukistemo.*

*La diferencojn oni jesas,
silentas pri l' similoj – emo,
en kiu fontas la problemoj;
kaj mison, kies fort' ne ĉesas,*

sur la infanajn cerbojn presas.




1954 03 29

William Auld

El *Rimletoj* de M. Boulton kaj W. Auld,
Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1976.

“Nia morgaŭa mondo devos nepre esti trans-etna kaj transnacia, ĉar la neeviteblaj ŝanĝoj [...] donis tiel urĝan impeton al tio...”



estro, ĉu la instruistoj en siaj lecionoj/klasoj kovros ankaŭ materialon pri la historio kaj sociaj sistemoj de landoj ekster Usono. Li, tute neĝenite, respondis, ke tio estus efektive bonega ideo. Tamen laŭ li mi certe konsentus ke, ĉar mankas tempo por fari ĉion, plej bone estus lerni pli detale la propran kulturon ol havi supraĵajn konojn pri aliaj, kaj eble konfuziĝi! Se miaj filinoj elektos studentigi en mia universitato, ili devige studos du kursojn de literaturo. El la du, unu povas esti la literaturo de alia lingvo kaj kulturo. Sed, ĉar tio estas laŭleakta, kaj ne multajn kursojn oni proponas, preskaŭ ĉiuj studentoj plenumos sian devon legante nur el la angalingva literaturo de la usonanoj kaj britoj.

Mi konas alian lernantinon, kies gepatroj donis al ŝi la sperton ne nur lerni Esperanton sed ankaŭ vojaĝi kaj korespondi per ĝi. En siaj lecionoj pri sociaj studoj, ŝi por siaj studprojektoj utiligis preskaŭ cent malsamajn kontaktojn en landoj tra la tuta mondo. Tiel ŝi informiĝis pri la sintenoj kaj perspektivoj de alikulturaj gejunuloj kaj informis siajn samklasanojn pri ili. Ne nur impresiĝis ŝia instruistino kaj aliaj instruistoj, al kiuj ŝi rakontis sian sperton en profesia konferenco, sed ŝi mem intelekte tiom profitis de la lingva kaj kultura lernosperto, ke ŝi povis elekti el inter la plej prestiĝaj universitatoj de la lando por siaj postlernejaj studoj.

Ne nur la propra lando, sed la tuta terglobo fariĝis la hejmo de tiu junulino. Nenion ŝi perdis, ĉar la laboro kiun ŝi faris respondis al la propraj intereso, kaj ĝuste tio motivigis ŝin por nature kontentigi la scivolemon kaj lerni pli. Ŝi

ne ricevis nur la perspektivon de instruisto kaj materialoj el la propra lando, en la propra gepatra lingvo. Unike plivastiĝis ŝiaj horizontoj kaj tiuj de ĉiuj membroj de la klaso. Ĉu tio estus okazinta simile per lecionoj pri fremda lingvo kaj kulturo? Efektive ne, pro multoblaj kialoj. Unue, kiam oni lernas en lernejo pri alia lingvo kaj kulturo, plejparte oni lernas la lingvon mem kaj ne havas la okazon ĝin utiligi por vere komunikiĝi kun la parolantoj de tiu lingvo kaj informiĝi pri iliaj ideoj kaj kulturo. Pro la malfacileco de la tasko, oni ofte lernas rezisti ne nur la lingvon sed ankaŭ la kulturon de ĝiaj parolantoj. Due, lecionoj pri fremdaj lingvoj preskaŭ neeviteble instruas pri diferencoj inter la kulturoj kaj iliaj reprezentantoj, kio plue fremdigas la lernantojn de la alia kulturo, ĉar ili sentas sin komfortaj en la sia, kaj emas kompari negative la alian kulturon kun la propra. Eĉ se la instruado sukcesus tiurilate, la mondo de la lernanto restus limigita al nur du kulturoj, tiel

ke ĝi povus rezultigi tute falsan senton pri larĝeco de vidpunkto kaj kompreno pri aliaj kulturoj. Tria, la edukado per Esperanto, esence ne-etna lingvo, havas tute alian rezulton. Lernantoj komunikas per la sama lingvo je la sama psikologia nivelo. Esperanto estas lingvo de tiu, kiu posedas ĝin, ne de alia fremda grupo, kiu ĉiam regos ĝin pli bone ol ni. Do la lernantoj ne timos per eraroj perdi la respekton de denaska parolanto de la lingvo, kiun ili strebas uzi precize, tamen neniam sciante ĉu ili vere ĝin uzas ĝuste aŭ ne. Kvare, kaj eble plej grave, tiu samnivela interŝanĝado de spertoj kaj ideoj reliefigas ne la eble amuzajn sed relative malgravajn diferencojn inter la kulturoj, kiel kutime okazas en la instruado de fremdaj lingvoj. Kvankam ankaŭ tiujn ili ne preteratentos, la lernantoj nature ekkomprenos la universalajn valorojn, kiuj estas komunaj al ili, kaj kiuj ligas ilin ĉiujn al la aliaj. Ili pli emos ekhavi sentojn de pacemo, respekto, amo, kaj ĝuon pri la interrilatoj kun aliaj gejunuloj kiuj efektive havas tre similajn spertojn, dezirojn kaj aspirojn kiel samaĝaj membroj de la homa raso.

Surbaze de tia reciproka interkompreniĝo, la lernantoj, gvidate de la instruisto, havos la eblecon ekzameni siajn antaŭjuĝojn kaj etnajn sintenojn, ankaŭ interne de la propra socio. Ili povos kompreni, ke "historio" ne estas simple objektiva katalogado de datoj kaj okazintaĵoj, kiun oni jam esploris kaj kiun ĉiu normala persono senpense akceptas. Sub tiaj kondiĉoj etna historio povos klare montri sin kiel subjektivan perspektivon de difinita popolo pri sia pasinteco kaj identeco en la hodiaŭa mondo. Tio inkluzivus ne nur pozitivajn strebojn por vivteni sin kaj gajni internan kaj eksteran respekton, sed la negativan tendencon malestimi kaj batali kontraŭ popoloj, kiuj ŝajne minacas nian pozicion. Oni povas kompari kiel oni traktas difinitan politikan aŭ historian problemon en landoj, kiuj havis historiajn rilatojn, ekzemple britoj kaj hispanoj pri la konfliktoj de la dekseca jarcento, kaj usonanoj kaj meksikanoj pri la teritoriaj rajtoj de la du nacioj en la moderna epoko.

Nia morgaŭa mondo devos nepre esti transetna kaj transnacia, ĉar la neeviteblaj ŝanĝoj en internaciaj rilatoj donis tiel urĝan impeton al tio ke postlasiĝis la eduksistemoj. La teĥnologaj rimedoj jam ebligis tujan kaj facilan internacian komunikadon. Per la utiligo de reta teĥnologio aldone al la jam etenditaj vojoj, la internacia lingvo povos malfermi eĉ pli vaste la pordon al vera senpera transnacia edukado. Por tiu celo la lingvo estas la sola kiu povos plene subteni la deziratan progreson. Nur per Esperanto ĉiu lernanto povos sen granda prokrasto transiri de lingvolernado al lingvouzado. Nur per la lernado de Esperanto ĉiu ricevos la ĝojon konstrui ponton al respekto de reprezentantoj de ĉiuj etnaj lingvoj, nacioj kaj kulturoj surbaze de nia komuna homeco kaj homfrateco.

Esperanto estas lingvo de tiu, kiu posedas ĝin



“Ĉar la militoj ekestas en la homaj mensoj, same en la homaj mensoj estu pretigitaj la defendoj de la paco.”

El la Konstitucio de Unesko



3 Pedagogia efikeco

Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

KATALIN SMIDÉLIUSZ
Lingvopedagogo

EN LA NUNTEMPA MONDO pli kaj pli necesa montriĝas koni fremdajn lingvojn krom la propra, nacia lingvo. La lingvolernado estas ne nur utila modo, sed ankaŭ socia neceso. Ĝi okupas grandan rolon en la lingvopolitiko de lingve ĉefe homogenaj kaj ankaŭ en plurlingvaj landoj. La tereno de la alproprigo de fremdaj lingvoj estas plejparte la lernejoj, instru- kaj edukinstitutoj de malalta ĝis alta gradoj. Alte kvalifikitaj, science kaj metodike preparitaj lingvoinstruistoj respondecas pri la sukceso. La laboro disvolviĝas surbaze de science preparitaj instrumaterialoj, helpe de modernaj, allogaj instruhelpiloj en teknike bone ekipitaj lingvolaboratorioj aŭ en la cellingva lando.

“... Tre ofte malgraŭ ĉiuj tiuj pozitivaj cirkonstancoj [...] la lingvolernantoj ne alvenas al la komunikkapablo.”



Tre ofte malgraŭ ĉiuj tiuj pozitivaj cirkonstancoj la rezulto restas signife pli malalta ol la atendita; la lingvolernantoj ne alvenas al la komunikkapablo.

Kio estas do la problemoj? Kio mankas al pli granda efikeco? Kial iras tiom malfacile tiu procezo? Multajn respondojn ni povas ricevi el la studoj de psikolingvistiko.

Dum la lingvolernado la lernanto devas alproprigi novan kod-sistemon por doni aliajn nomojn al la jam konataj aferoj, esprimi ankaŭ alimaniere siajn sentojn kaj pensojn. Sed la nova lingvo estas aŭ malsimila de la gepatra, jam konata lingvo, aŭ ĝene simila al tiu. Ambaŭkaze la lernanto devas alfronti malfacilaĵojn. Leksike kaj strukture tro malsimilaj kod-sistemoj bezonas tro da energio por la transformado, dum lernante similan lingvon parencon al la gepatra oni inklinas esti supraĵema, ne preciza. La malfacilaĵoj plej ofte senluziigas la lernanton; la manko de sukcesosento forpuŝas lin aŭ ŝin de plua laboro.

Se la lernenda lingvo estus gramatike simpla, fonetike kaj ortografie facile alproprigebla, kaj ne havus centojn da neregulaj fenomenoj, la formuloj estus kreive manipuleblaj; post iom da sperto en la lingvo la lernanto povus kalkuli je siaj pretendoj, tiuj vere efektivigus, kaj la sukcesoj redonus la investitan energion.

Esperanto estas tia lingvo.

- *Ĝia reguleco donas memfidon kaj certecon.* Oni ne devas ĉiam timi ne memori kaj malbone uzi iun regulon, kiu malsimilas al la ĝeneralaj reguloj.

- *Ĝia simpleco faciligas la manipuladon de la strukturoj.* Ekzemple en multaj lingvoj unu el la malplej venkeblaj aferoj estas ellerni la komplikajn formojn de la verbosistemo. En Esperanto laŭ la tempoj ĉiu verbo havas nur unu formon por ĉiuj personoj kaj nombroj. Ilin distingas nur la personaj pronomoj: *mi parolas, vi parolas, li/ŝi/ĝi parolas, ni parolas, vi parolas, ili parolas.* Kaj same, senescepte ĉe ĉiu verbo.

- *Ĝia afiksa sistemo inspiras al kreiva, produktiva lingvouzo kaj logika pensado. Helpe de la afiksoj la parolanto povas signife riĉigi sian vortprovizon.* Konante la afiksosistemon, la lernanto povas mem krei el unu vortradiko multajn aliajn vortojn: *sana -> malsana* (kontraŭa signifo), *sanulo* (persono kiu havas tiun econ), *malsanulejo* (loko de aŭ por tiuj homoj, kiujn karakterizas la radika eco), *malsanulejestro* (ĉefo de tiu loko) ktp. Bona cerba gimnastiko kaj logika ludo estas ne nur produkti sed ankaŭ deĉifri tiajn vortojn de la komunikpartnero.

- *Alproprigante ĝin la lernanto ricevas trvideblan ĝeneralan strukturan modelon pri la lingvoj, kaj ties elementoj utiligeblas dum postaj lingvolernaj kaj lingvouzaj procezoj.* Hungaro kaj japano povas alkutimiĝi al la prepozicioj, ruso kaj polo al la artikolo, italo spertos la ekziston de lingvoj en kiuj la ĉefelemento staras fine de la kunmetitaj vortoj. Lernante la sekvan fremdan lingvon, la lernanto jam scivole atendas ĉu la nova lingvo funkcias laŭ lia gepatra lingvo aŭ laŭ la alia lernita lingvo.

- *Ĉe la komparo de la gepatra kaj la lernata lingvoj la lernanto konsciiĝas ankaŭ pri la ĝis tiam instinkte uzitaj ge-*

reguleco donas memfidon

facile manipuli strukturojn

inspiro al kreivo

modelo pri la lingvo

pli bona kompreno de la gepatra lingvo

vortoj el multaj lingvoj

el sukceso kreskas lernemo



Mia panjo, jam plenaĝa
En la sesdekoka jaro
Nun eklernas Esperanton.
Mia panjo, tre kuraĝa,
Sen fiero, sen fanfaro,
Kultas novan verdan planton.



El *Por mia patrino*
en *Kontralte* de Marjorie Boulton,
La Laguna: J. Régulo, 1955.

Ĉu Esperanto pliigis interesiĝon pri fremdaj lingvoj inter finnaj esperantistoj? (en %)

Eduk-nivelo:	Elementa	Meza	Alta	Averaĝe
JES	86,5	65,0	63,2	71,8
NE	5,8	27,5	26,3	19,5

Rašić 1994, p. 65

patralingvaj strukturoj; tiel la lernado de fremda lingvo helpas la lernadon ankaŭ de la gepatra lingvo. Tio multe kontribuas ne nur al lingvoinstruaj, sed ankaŭ edukaj celoj.

- *Etimologie la leksiko de Esperanto devenas el pluraj lingvo(familio)j.* Tio povas helpi dum la komprena fazo, kaj la jam lernitaj vortoj riĉigas la ĝeneralan inteligentecon kaj poste povos helpi en la lernado de alia lingvo.

- *La rapidaj sukcesoj en la lingvouzo kaj la relative facilaj ebloj esprimi sin donas grandan motivon por la plua lernado kaj kreas deziron provi alproprigi ankaŭ aliajn lingvojn.* La kono de pluraj fremdaj lingvoj vastigas la scion pri la mondo kaj helpas interkompreniĝi, amikiĝi, kunlabori kun alinacianoj.

Ĉe kiuj funkcias la supre menciitaj elementoj? Al kiuj ni proponu tiucele lerni la internacian lingvon?

Plej rimarkeblaj tiuj pozitivaj faktoroj estas ĉe infanoj, por kiuj Esperanto estas la unua fremda lingvo. Ĉe ili la malkovro de la funkcipovo de alia lingvo kaj la akiritaj pozitivaj spertoj en la komunikado en tiu negepatra lingvo signifas grandan motivigon al la lernado de la sekvaj fremdaj lingvoj.

La simpla kaj logika lingvo povas funkcii kiel enkonduka modellingvo ankaŭ ĉe tiuj pli aĝaj personoj, kiuj antaŭe spertis malfacilaĵojn alproprigi iun fremdan lingvon. Post la sukcesoj en la lernado de Esperanto, lerninte universalajn ecojn de la lingvostrukturoj, provinte metodon de lingvolernado kaj havinte pozitivajn spertojn ili ofte ekhavas emon al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj.

Pedagogiaj eksperimentoj pruvas, ke post la lernado de Esperanto signife altiĝas la efikeco en la lernado ankaŭ de aliaj fremdaj lingvoj. Ties gradoj diversas laŭ la simileco inter la gepatra lingvo kaj tiu dua (post-Esperanta) fremda lingvo.

El lingvistika vidpunkto Esperanto multe pli utilas por krei ponton inter strukture malproksimaj lingvoj (por hungaroj lerni la italan lingvon) ol inter lingvoj apartenantaj al la sama lingvofamilio (por italoj lerni la francan lingvon). Tamen, ankaŭ en la laste menciitaj kazoj la rapide atingeblaj sukcesoj, la motivigaj faktoroj kaj la akireblaj homaj valoroj pravigas la investon.

Pekas tiuj, kiuj scias kaj tamen silentas pri rimedo kiu helpas atingi iun bonan celon, plifaciligas aŭ mallongigas la vojon tien kondukantan.

Senrespondece riskas tiuj, kiuj ekkonante la eliksiron almenaŭ ne provas ties veran efikecon.

Esperanto estas tia helpilo kaj ni esperantistoj pretas dividi ĝin kun la mondo.

4 Plurlingveco

La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

Kiam oni renkontas fremdulon, unu el la kutimaj demandoj estas: “Kiun lingvon vi parolas?” En ĉi tiu laŭŝajne senkulpa demando estas kaŝita tuta resumo de la ideologia evoluo de okcidenta Eŭropo (kaj ne nur ĝi) dum la lastaj jarcentoj.

En okcidenta Eŭropo laŭgrade dum la formiĝo de la grandaj modernaj ŝtatoj formiĝis la ideo ke la ideala civitano estas unulingva parolanto de la sama lingvo, kiun parolas la reĝa kortego. Ja, certe, ĉiuj sciis ke multaj el la civitanoj, ekzemple la kamparanoj, parolas malsame ol la reĝo, sed aliflanke tiuj ne estis modelaj civitanoj, kaj oni devis labori por igi ilin kiom eble plej similaj al modelaj civitanoj.

En la grandaj imperioj de la antikveco, ĉiuj akceptis la fakton ke la subuloj estas plej malsam-specaj kaj ke ili parolas siajn lingvojn. Tio ĝenis neniun, ĉar tio estis parto de la vivo. Kompreneble se oni volis paroli kun fenikaj komercistoj, oni devis lerni la fenikan, aŭ ili devis lerni la lokan lingvon. Kompreneble se oni volis aŭ devis iĝi soldato en la turka armeo, oni devis aldoni la turkan al sia lingva repertuaro; aŭ, oni ne povis iĝi katolika pastro se oni ne lernis la latinan.

Ĉi tiu relative tolerema vidpunkto malaperis kun la ekesto de la grandaj eŭropaj ŝtatoj. Eĉ la postaj revolucioj, ĉefe la franca, ne forigis ĝin. Male, oni emfazis la fakton ke egalaj civitanoj devas esti egalaj pri ĉio, inkluzive de la lingvo.

Aliflanke, faktoj estas ofte pli obstinaj ol teorioj. Se oni rigardas la mondon nun, oni vidas ke granda parto (la plej granda laŭ pluraj lingvistoj) de la homaro estas nature plurlingva. Oni parolas unu lingvon hejme kaj alian lingvon en la bazaro, en la oficejo aŭ en la preĝejo. Kutime tio ne kaŭzas problemojn, se ne ekzistas premoj de unu grupo altrudi sian lingvon kaj malpermesi la lingvon de alia grupo.

En la lastaj jardekoj ankaŭ studentoj el teorie unulingvaj landoj komencis demandi sin ĉu tiuj politikoj, kiuj celas forigi la lingvan malsamecon interne de landoj, estas justaj kaj ĉu

RENATO CORSETTI
Psiĥolingvisto



François Rude:
Marsejzo, 1833-36

ili estas efikaj (en kelkaj landoj oni pretas akcepti maljustaĵojn se ili havas la sekvon porti efikecon).

La problemo estas pli aktuala ol ĉiam pro pluraj lastatempaj fenomenoj. Unuflanke la nova komunika teĥnologio ebligas pli kaj pli da trans-lingvolimaj kontaktoj, kaj aliflanke la grandaj migrado-ondoj portas ĉiutage homojn de unu lingva teritorio al alia.

Kion ni devas alstrebi en ĉi tiu situacio?

La pledantoj por efikeco je ĉia kosto postulas ke oni devigu (se necese per leĝoj kaj polico, aŭ simple per ekonomia forto) unuflanke la parolantojn de malfortaj lingvoj rezigni entute pri siaj lingvoj almenaŭ en kelkaj kampoj (litovoj, danoj, nederlandanoj, turkoj, japanoj kaj multaj aliaj devus simple lerni la lingvon de la fortuloj en la unuopaj kampoj de la internacia vivo), kaj aliflanke la enmigrintoj devus kiel eble plej rapide forgesi sian hejman lingvon, se eble ankaŭ sian hejmlandon, kaj iĝi modelaj civitanoj de la akceptantaj landoj.



Cornelis Anthonisz.
Teunissen:
*La detruo de la Babela
Turo*, 1547.

La lingvistoj kaj la pledantoj por justaj rilatoj inter la hom-grupoj malkovras ĉiutage kiom malfacile estas plenumi la ĉi-supre prezentitajn ideojn. En internaciaj rilatoj la potenco-pesilo daŭre ŝanĝas sian pozicion. Popolo, kiu nur hieraŭ ŝajnis destinita je malapero aŭ daŭra postlamado de aliaj, abrupte iĝas potenca kaj asertas siajn rajtojn (ankaŭ lingvajn). La nuna situacio ne estas eterna, kvankam ĝi povas ŝajni al ni, samtempuloj, tia. Se en la jaro 2050 Usono havos la hispanan kiel la plej uzatan lingvon, kion faros ĉiuj nunaj pledantoj por la angla kiel internacia lingvo?



“... oni remalkovras ke homoj povas esti du- aŭ plur-lingvaj, kaj ke tio ne aŭtomate alportas katastrofojn...”

En enŝtataj situacioj oni daŭre malkovras ke la fando-politikoj ne estas sendoloraj kaj senkostaj. Eĉ pluraj situacioj, kiuj ŝajnis dumeterne solvitaj, en la lastaj jardekoj montriĝis ne esti tiaj. Kiu, ekzemple, antaŭvidus antaŭ kvindek jaroj, ke irlandanoj rekomencos lerni kaj paroli la irlandan en Dublino?

Fronte al ĉi tiuj okazaĵoj ankaŭ en la tradiciaj lingve unu-ismaj landoj oni remalkovras ke homoj povas esti du- aŭ plur-lingvaj, kaj ke tio ne aŭtomate alportas katastrofojn. La babilonaj imperiestroj, kiuj sciis tion, verŝajne ridetas el la trans-mondo.

Sed ankaŭ esperantistoj rajtas rideti. La Esperanto-movado, fakte, konsistas el homoj kiuj senescepte estas almenaŭ dulingvaj. Ne rezignante pri sia lingvo, ili lernis kaj komencis paroli alian lingvon. La mondkonaj sekvoj de tio estas klaraj al ĉiuj parolantoj de Esperanto, sed tre malfacile klarigeblaj al unulingvuloj — ĉefe al tiuj kiuj provis dum jaroj lerni fremdan lingvon, sed ne atingis eĉ la nivelon necesan por mendi kafon senprobleme. Per Esperanto ni volas doni ankaŭ al ili la praktikan eblon iĝi dulingvulo.

ĉiu esperantisto estas almenaŭ dulingva

5 Lingvaj rajtoj

La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potenco-diferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimatajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

UWE JOACHIM MORITZ

*Vicprezidanto de Internacia
Komitato por Etnaj Liberecoj*

***plej gravas la rajto uzi
sian denaskan lingvon***

*digloseco: situacio, en kiu du aŭ pli da lingvoj aŭ dialektoj estas uzataj en malsamaj funkcioj aŭ por malsamaj (prestiĝaj aŭ neprestiĝaj) celoj

EVIDENTE, ĉi tie temas pri rajtoj ne de lingvoj, sed pri la rajto de homoj plene uzi sia(j)n lingvo(j)n en ĉiuj vivsektoroj kaj sur ĉiuj niveloj. Cetere, ni konsciu ke rajto tute ne devigas. Se, pro kiu ajn motivo, vi preferas paroli aŭ skribi nek en via denaska lingvo nek en Esperanto, sed en iu kiun vi adekvate regas el la 5000 etnaj lingvoj de la mondo, vi plene rajtas utiligi ĝin.

Plej gravas, ĉiukaze, la rajto uzi sian denaskan lingvon, kiun oni regas pli bone ol iun alian. Ni prenu konkretajn situaciojn:

- Kiam geetuloj eniras infanvartejon aŭ la unuan klason de elementa lernejo, ĉu ili “naĝos” en sia familia lingva medio aŭ ĉu oni puŝos ilin en nekonatan lingvan maron?
- En kiu lingvo okazos, 10 aŭ 15 jarojn poste, profesilernado aŭ universitataj studoj?
- Ĉu necesas unue lernegi la ŝtatan lingvon aŭ eĉ la anglan por povi legi la bezonatajn fakajn librojn?
- Ĉu la sekretario de via urbestro, la juĝisto kaj aliaj aŭtoritatuloj scipovas vian lingvon, aŭ ĉu vi, simple, adaptas vin al ili, laŭ la “demokrata” principo ke ni obeu la plimulton?
- Ktp.

Por la plej multaj esperantistoj, la ĉi-supraj demandoj ne ŝajnas problemaj, ĉu pro tio ke ilia denaska lingvo estas la ŝtata (aŭ unu el la diversaj ŝtataj lingvoj), ĉu pro tio ke ili estas tiel “bone” edukitaj ke ili ne plu konscias pri la jam kutima digloseco*.

Ni demandu alianivele:

- Ĉu vi mem aŭ viaj samlandaj specialistoj pri — ni diru ekzemple — muzik-historio aŭ zoologio parolas vian/sian denaskan lingvon en internacia kongreso?
- Kiun lingvon uzas via ministro pri eksterlandaj aferoj en

diskutoj kun siaj gekolegoj en Unuiĝintaj Nacioj?

- Ĉu via komerca entrepreno havas ŝancojn en la tutmonda merkato, se vi utiligas vian denaskan lingvon kaj se tiu ĉi ne estas la kastilia, franca aŭ angla?

- Ktp.

Nun, probable, ĉiuj esperantistoj unuanime protestos kontraŭ la nejusta lingvouzo sur internacia scenejo kaj ripetos sian tiel ofte prezentitan postulon pri enkonduko de la internacia lingvo. Prave.



“... [ili] ne postulu pli da lingvaj rajtoj, ĉar ilia lingvo simple ne [...] disponas pri la leksikaj rimedoj [...] pri nuklea ĥemio...”

Tamen, ĉu vi jam demandis vin, ĉu ni estas kredindaj kaj fidindaj, kiam ni vojaĝas sub la flago de “movado por lingvaj rajtoj”?

La ĝenerala Esperanto-movado ankoraŭ ne konscias pri la dua dimensio de la tutmonda lingvo-problemo. Se la uzantoj de la internacia lingvo pledas por la rajto libere utiligi sian propran lingvon, ili nepre ne fermu la okulojn antaŭ la diskriminaciado praktikata interne de la plej multaj ŝtatoj.

Mi asertas ke la lingvaj problemoj, kun ĉiuj konsekvencoj derivitaj el ili, estas multe pli gravaj por, ekzemple, bretono, sorabo, sameo aŭ friso, ol por nederlandano, suomo, germano aŭ franco. La anoj de lingvaj minoritatoj duoble suferas la ĝenojn kaj ŝarĝojn de siaj samlandaj lingvomajoritatoj. Pro praktikaj kaj juraj kaŭzoj, la minoritatoj normale lernas kaj sekve scipovas (la) oficialan lingvon de sia ŝtato. Krome, ili pli-malpli posedas sian denaskan — ofte gepatran — propraetnan lingvon. Depende de la historia situacio kaj de aliaj faktoroj, en multegaj kazoj tiu ĉi lingvo ne estas ĝisdate evoluinta kaj do ne preta por ĉiukampa aplikado. Konsekvence tiaj minoritatoj vole-nevole ne estas veraj dulingvuloj, sed diglosuloj: ili uzas sian propraetnan lingvon en iuj rilatoj (kutime en la familio, inter geamikoj, en la propra kvartalo/vilaĝo, eventuale en sia profesio kaj iom en kultura aktivado),

☞

*Jen popolo,
ligu ĝin per ĉenoj,
kaj senvestigu ĝin,
ĝtopu ĝian buŝon,
ĝi tamen liberos.
Prenu for laboron
kaj ĝian pasporton
kaj la manĝotablon
kaj la dormoliton,
ĝi tamen plu riĉos.
Ĉar popolo
iĝas malriĉa kaj sklava,
se oni prenas la lingvon
donitan de la gepatroj:
ĝi por eterne estos perdita.*



Ignazio Buttitta,
sicilia poeto (n.1899).
Trad. Renato Corsetti

kaj la alia lingvo servas por oficialaj celoj (lernejo, administracio, “granda politiko”) kaj rilatoj kun eksteruloj.

Iu naivulo diros ke, do, tiuj diglosuloj ne postulu pli da lingvaj rajtoj, ĉar ilia lingvo simple ne estas ĝisdata, ne disponas pri la leksikaj rimedoj por lekciado pri nuklea ĥemio kaj tiaj komplikaĵoj. Plene maltrafe. Ĉu la franca aŭ la itala aŭ la angla aŭ la ... lingvo nun disponus tiujn terminojn, se ankoraŭ la lingvo de la kleruloj estus la latina? Ĉar ekzistis nek polico kaj armeo nek “logikaj” leĝoj por protekti la monopolon de la latina lingvo, la koncernaj etnoj, kun sufiĉe progresintaj ŝtataj strukturoj, povis lingve emancipiĝi dum jarcentoj. Samspire, ili plialtigis la obstaklojn por akiro de tiaj rajtoj fare de la lingvaj minoritatoj.

Kion ni substance postulas, kiam ni pledas por lingvaj rajtoj?

Ne sufiĉas la jura samrajtigo de ĉiuj lingvo-komunumoj, kvankam tio estas la nepra antaŭkondiĉo. Multegaj el ili — ankaŭ inter la ŝtatnivelaj kiel, ekzemple, la luksemburga kaj la irlandgaela — bezonas moralan apogon por ke ili ne rezignu rezignacie pri la rajto ĉie — ankaŭ en la eŭropaj institucioj — uzi sian respektivan lingvon. Krome, ili bezonas ekonomian subtenon por profunde modernigi siajn lingvojn, interalie, per pretigo de ĝeneralaj kaj fakaj vortaroj kaj lernolibroj pri kaj — elstare grave — en la koncernataj lingvoj.

Nur kiam ĉiuj lingvokomunumoj estos jure kaj fakte emancipiĝintaj, memstaraj, “plenkreskaj” — nur tiam ili estos maturaj por eventuale cedi iujn rajtojn al pli altnivelaj organizaĵoj (Eŭropa Unio, Unuiĝintaj Nacioj k.s.). Tiam povos regi lingva — kaj sekve, espereble, ankaŭ kultura — demokratio, kondiĉe ke la lingva tegmento por ĉiuj, la ponto inter ĉiuj komunumoj, estos internacia, neŭtrala esprimilo. Evidente, ankaŭ tiu ĉi komunikilo devos esti matura, preta por ĉiuj interhomaj bezonoj, ĉar sen tia prepariteco la plej grandiozaj rajtoj valoras nenion.



"Esperanto-literaturo inkluzivas multajn originalajn verkojn kaj tradukojn de klasikaj kaj popularaj aŭtoroj... [Ĝia] elstara trajto, facile klarigebla, estas la graveco de verkistoj el malgrandaj lingvoj..."

NITOBÉ Inazoe en 1921;
Fettes & Bolduc 1998, p.71

Libroservo en la Praga UK

6 Lingva diverseco

La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivajospicio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

LASTATEMPE kreskas konscio pri la minacanta malapero de granda parto — de 90 ĝis 95% — de la ses ĝis sep mil lingvoj de la mondo. Ĉiujare aperas pli da libroj, sciencaj kaj ĵurnalistaj artikoloj, konferencoj kaj manifestoj pri tiu problemaro. La starpunktoj estas tamen tre diversaj, ĉu temas pri la kaŭzoj de lingvo-malapero, ĉu pri ĝiaj signifoj kaj konsekvencoj, ĉu pri la plej trafaj strategioj por lingvo-konservado.

Koncerne kaŭzojn, la Manifesto fingromontras al la nacio-sistemo nun reganta la mondan politikon. Laŭ la internacia juro, ŝtatoj estas preskaŭ plene decidrajtaj pri ĉio ene de siaj limoj. Precipe demandoj pri kultura kaj lingva identeco estas konsiderataj “enlanda” afero. Kaj kiel montris pluraj esploristoj pri lingvaj rajtoj kaj lingva diverseco (ekzemple Joshua Fishman, Tove Skuttnabb-Kangas kaj Robert Phillipson), la ondoj de moderna kiuj ruliĝis el Okcidenta Europo dum la 17-a, 18-a kaj 19-a jarcentoj kunportis unulingvismon kiel bazan principon de la moderna ŝtato. Eĉ tiuj ŝtatoj kiel Kanado, Svisio kaj Belgio, al kiuj la historio trudis du grandajn kaj potencajn lingvajn grupojn, tra la 20-a jarcento evoluis al ilia maksimuma disigo en unulingvajn erojn de federacia ŝtato.

La Manifesto mencias du ĉefajn motorojn de tiu unulingviga procezo. La unua, la komunika, datiĝas jam de la lastaj jaroj de la 15-a jarcento, kiam aperis la unua projekto de normigita nacia lingvo, la hispana. Laŭ Ivan Illich, tiu subita salto en la lingvo-teknologio estis reago al la disvastiĝo de la presarto, kiu minacis disrompi la eklezian kaj reĝan monopolon super la skriba vorto. Ĉar elitoj ĉie kaj ĉiam celas certigi sian propran potencon, baldaŭ tra Eŭropo disvastiĝis normlingvoj bazitaj sur la parolmanieroj de la kleraj sociaj tavoloj. Tiun disvastiĝon definitive sigelis la apero de la moderna naciismo en la 18-a kaj 19-a jarcentoj — kolonia invento, laŭ Benedict Anderson, kiu baldaŭ trovis imitantojn en la eŭropaj hejmregnoj.

MARK FETTES
Lingvo-sociologo

*moderna ŝtato
estas unulingva*

*normlingvo kiel
rimedo de potenco*

Eble estas kritikinde, ke la Manifesto ne aludas al la ideologia flanko de la unulingvismo, ekzemple aldonante la vorton *unueco* al *komunikado*. Estas ja tute klare, ke alilingvanoj estas ofte konsiderataj ne nur kiel nekomprenemuloj, sed ankaŭ kiel potencialaj ŝtatperfiduloj.

La dua motoro, evoluigo, estas pli freŝdata invento. Laŭ Wolfgang Sachs kaj liaj kolegoj, la ideo ke ĉiuj ekonomiaj sistemoj devas “evolui” en la sama direkto, aperis nur fine de la dua mondmilito. Tamen, sub tiu vesto kaŝas sin unu el la ĉefaj principoj de la koloniismo: la ideo, ke la monda historio nature kulminis en la ekonomiaj kaj politikaj sistemoj de la

industriaj landoj, kaj do aliaj landoj kaj socioj povas elekti nur inter eterna postrestado aŭ fidela asimilado de la samaj modeloj. Tiu ideo nun superregas la mondon en nekredebla grado: iusence ĉiuj landoj, eĉ Usono, iĝas ĝiaj kolonioj. Temas pri sistemo kiu ĉiam pli kaj pli favoras Egecon — kompaniegojn, ekonomiegojn, kaj ankaŭ lingvegojn. Estas tre dubinde, ĉu tia sistemo estas daŭripova, sed ĉi-momente, fine de la dudeka jarcento, ĝia influo estas ĉiea. Etajn firmaojn glutas pli grandaj, etaj ekonomioj sklaviĝas al la postuloj de la egaj, kaj indiĝenaj lingvetoj cedas al regionaj aŭ naciaj idiomoj.



“... La sola alternativo al amasa ‘lingvocado’ estas la disvastigo de ekologia rigardo en la kultura sfero, paralele al la biologia.”

La unikeco de Esperanto — kaj laŭ mi, la ĉefa kaŭzo de ĝia tre limigita disvastiĝo — kuŝas en tio, ke ĝi prezentas *sisteman* alternativon sur la lingva kampo. Multaj argumentis kaj daŭre argumentas por Esperanto, kvazaŭ ĝi estus simple speco de oleo por la radoj de la monda komunika maŝino: ia “metra sistemo de la lingvoj”. Sed metroj kaj gramoj ŝanĝis nenion en la fizika mondo; ili simple plisimpligis la kalkulojn. Esperanto, aliflanke, kapablas ŝanĝi sintenojn, potencrilatojn, eĉ nian koncepton de la fenomeno “lingvo”. Kaj ĝuste tiaj subjektivaj faktoroj subtenas la socian ordon — ĉian socian ordon. Se la tuta mondo, aŭ ĝia granda parto, aliĝus al la “Esperanto-komunumo”, la du aŭ tri menciitaj motoroj de unulingvigo simple ĉesus funkcii, ĉar la homoj ne plu kredus je ili. Eble la novaj kredoj estus egale mitaj, sed ili tutcerte spegulus la *plurlingvan* realon de la mondo, al kiu Esperanto estas adaptita. La unulingvigaj mitoj radikas en la ŝtatkonstrua epoko, kaj subtenas lingvosistemon kaj lingvistikon artikitajn per naciaj normlingvoj. Esperanto, kontraste, subtenas lingvosistemon kaj lingvistikon, kie centras la *interindividua* komunikado: “*ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj*” kiel Zamenhof trafis formulis tion en Bulonjo.

La Manifesto asertas, ke en tia lingvosistemo ĉiuj lingvoj nepre taksigus valoraj kaj “indaj je protektado kaj subtenado”. Nu, tio estas eble unu el la novaj mitoj, kiujn Esperanto naskas por anstataŭigi la naciajn. Lingvoj estas ŝanĝiĝemaj kaj ĉiam kontestataj aferoj, intime interplektitaj kun emocioj kaj ideologioj, samtempe praktikaj iloj de negocado kaj transcendaĵoj simboloj de identeco. Ne eblas kredinde prognozi la sorton de ĉiuj lingvoj, se Esperanto disvastiĝus tutmonde: ĉu, ekzemple, la buŝaj tradicioj ne plu malaperadus cede al la skribaj? La Manifesto tamen pravas en sia kerna aserto. Granda parto de la riĉeco de Esperanto devenas de la denaskaj kaj naciaj lingvoj de ĝiaj parolantoj, kaj de la variaj kulturoj esprimataj en tiuj lingvoj. La parolantoj de Esperanto, kiel elokvente argumentis Auld kaj Daŝgupto, ĉerpas ne el iu “internacia” kulturo senigita de lokaj koloroj kaj odoroj, sed el la buntaj renkontoj de ĉiu loka kulturo kun la Alia — la reala aŭ imagita gasto sub kies rigardo oni ordigas kaj elmontras sian hejmon. Tia gastamo (kaj gasta ĝentileco) kernas en la Esperanta lingvosistemo. Naciaj lingvoj, male, estas nek bonaj gastoj nek bonaj gastigantoj: hejme, ili aspiras al muzeeca ordo, kvazaŭ tro zorgaj kuratoroj; malhejme, ili batas la tablon, postulante ke ĉio estu “kiel ĉe ni”.

Gastado kernas en iu ajn ekologia rigardo al la mondo. Tial ne surprizas la Manifesta komparo inter lingvoj kaj vivaĵospecioj, ĉar Esperanto enkorpiĝas sintenon nur lastatempe disvastigitan de la ekologia movado: la ideon, ke ni ĉiuj estas gastoj sur la tero, etike devigataj pludoni ĝin kiel eble plej bonfarta al niaj posteuloj. Mi forte suspektas, ke la sola alternativo al amasa “lingvocado” (pli-malpli intenca senlingvigo de la mondo) estas la disvastigo de ekologia rigardo en la kultura sfero, paralele al la biologia. Kaj tio montras, kiel defia kaj ĉiam pli urĝa estas la tasko kiun ni transprenas kune kun tiu ĉi “simpla” lingvo.

Kion fari, por doni konkretan sekvon al la konstatoj de la Manifesto? Unue, klerigi nin mem pri la lingvoj ĉirkaŭ ni: pri la ecoj, luktoj kaj sortoj de la multaj indiĝenaj kaj enmigrintaj lingvoj en nia propra ŝtato. Due, serĉi kontaktopunktojn inter tiuj lingvoj kaj Esperanto: ian tradukon, ian broŝuron aŭ artikolon, eble seminarion aŭ eĉ lingvokurson. Trie, verki etnolingve pri la ekologiaj ecoj de Esperanto — ne krude, laŭ la devizo “Esperanto aŭ nenio”, sed kulpense, montrante la paralelojn kaj invitante pluan dialogon kaj kunlaboron. Kvare, esplori la eblojn de konstantaj rilatoj inter E-organizaĵoj kaj asocioj por minacataj aŭ minoritataj lingvoj. Kvin, subteni la agadon de IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) aŭ de aliaj E-organizaĵoj aktivaj sur la kampo de minoritataj kaj lingvaj rajtoj. Sese . . . sed mi ne forprenu de vi la plezuron de propraj elpensaĵoj kaj malkovroj!

"La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenan devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton."

L.L. Zamenhof en
la Krakova UK, 1912

***ni ĉiuj estas gastoj
sur la tero***



7 Homa emancipiĝo

Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

SPOMENKA ŠTIMEC
Verkisto

ESPERANTO eniris la dekduan jardekon de sia ekzisto. Kvankam tio estas “nur eta parentezo de la historio, nur fingroĉerpeto el la senfunda tempujo” (laŭ la akademiano Ivo Rotkviĉ parolinta pri la tempopasado), restas profundaj spuroj de Esperanto en la mondo kiu nin ĉirkaŭas.

Unu el tiuj fokusoĵoj en kiuj Esperanto elstaris en la pasintaj jardekoj estas la emancipiĝo. Esperanto helpis al multaj siaj uzantoj liberigi sin el la dependo de la nacia lingvo kaj la nacia kulturo, kien plantis nin la naskiĝo. Ĝi levas siajn uzantojn ekster la limojn en kiujn onin enfermis la nacia lingvo kaj la nacia eduko, ĝi portas nin super la landlimojn kaj renkontigas nin kun la aliaj homoj, moroj, kulturoj kaj mondoj.

Multajn homojn kiujn ĝi allogis, ĝi sorĉis per aldona plezuriga eco: ĝi ebligas al siaj uzantoj kreivon — la parolantoj de Esperanto ĝuas la lingvon, ĝi donas al ili plezuron de “trafa ŝerco” kaj “kvalita vino” (laŭ Piron), ĝi donas plaĉon al la parolanto dum tiu ornamas sian frazon per vortumoj sukplenaj kaj nuanĉitaj, kiajn la denaska lingvo ofte ne kapablas proponi. Ne malpli da plezuro donas ĝi al la deĉifronto, la akceptanto de la mesaĝo.

Esperanto rompas la kadrojn en kiujn perforte enfermas nin la edukiĝo, al kiu ni estas submetitaj. Ĝi proponas pliajn fenestrojn al la scioj de la mondo per rimedoj modestaj, rapidaj kaj nekostaj.

Kvankam Esperanto pro sia deveno kaj siaj celoj ankoraŭ ne elluktis por si la statuson de la lingvo egalrajta al la aliaj lingvoj, kaj kvankam ĝi mem ankoraŭ atendas sian plenan emancipiĝon, intertempe ĝi emancipas siajn parolantojn. Esperanto tamen ne portas emancipon al ĉiuj siaj parolantoj. Nur tiujn ĝi komfortigas per

La plej gravaj motivoj por daŭra okupiĝo pri Esperanto inter membroj de UEA (1991):

rango	relativa valoro
1 <i>kontribuo al pli bona mondo</i>	6,02
2 <i>kono de homoj el aliaj landoj</i>	5,63
3 <i>intereso pri lingvoj</i>	5,04
4 <i>sento de aparteno al la E-komunumo</i>	4,66
5 <i>legado de libroj kaj revuoj</i>	4,38
6 <i>vojaĝado</i>	3,80
7 <i>personaj rilatoj kun proksimuloj</i>	3,26
8 <i>utileco en profesio aŭ ŝatokupo</i>	2,18

Raŝić 1994, p.86

emancipiĝo, kiuj kapablas eluzi la latentajn riĉojn de la lingvo. La parolantoj kiuj investis en la lingvon iom pli ol la energion kaj tempon necesajn por la baza lingvoakiro, estas abunde rekompencataj, precipe kiam ili esploras la eblajn sed ĝis nun ankoraŭ neplugitajn vojojn de la internacia apliko.

Dum oni aliras Esperanton oni ne konjektas ties emancipan dimension. Ĝi lasas sin malkovri poiome, ĝi montras sin kiel kromrezulton de la lingva alproprigo.



“... kvankam ĝi mem ankoraŭ atendas sian plenan emancipiĝon, intertempe ĝi emancipas siajn parolantojn.”

Esperanto kun si portas aliron al multspecaj kaj diversfonaj scioj. Kvankam ni ĉiuj plurfoje fariĝas atestantoj pri tio ke Esperanto ne estas estimata, evidentiĝas ke eĉ tiuj kiuj ne estimas Esperanton, montras estimon al la scioj kaj spertoj akiritaj per la internacia lingvo.

Kion alportos la ir-peno supren en la jardekoj venontaj dependos ĉefe de ni, la uzantoj de la lingvo, kaj de nia kapablo ne nur ĝui, sed ankaŭ tiri la konsekvencojn el la malsklavigo kaj egalrajtigo kiujn Esperanto ebligas.

"La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu 'ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn', donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la esperantismo ne respondas."

El Deklaracio pri la esenco de la esperantismo (Bulonjo-ĉe-Mar, 1905)

Por plua legado

Jen nur kelkaj titoloj pri la temoj de ĉi tiu broŝuro. Bv. konsulti la librokatalogon de UEA por pli da esperantlingvaj verkoj. Inter libroj ne en Esperanto, ni listigis nur kelkajn en kelkaj lingvoj. Ankaŭ en aliaj lingvoj ekzistas simila materialo, sed la redaktintoj ne povis trovi la necesajn informojn.

Eventuala interkrampa cifero indikas la ĉapitron al kiu la koncerna titolo (ĉefe) rilatas.

- Anderson, Benedict. 1983. *Imagined Communities: Reflections on the Origin and Spread of Nationalism*. London/New York: Verso. (6)
- Auld, William. 1978. *Pri lingvo kaj aliaj artoj*. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto. (2, 6)
- Becker, Ulrich (red.). 1995. *Vivprotokoloj 1. Vivrakontoj de 13 "simplaj" esperantistoj*. Berlin: Monda Kunagado kaj Kulturring in Berlin. (2, 7)
- Corsetti, Renato (red.). 1984. *Diskriminacio: Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto*. Rotterdam: UEA. (2, 5)
- Daŝgupto, Probal. 1993. Postparolo. En A. Montagut, *Poemo de Utnoa*. Wien: Pro Esperanto, 203-216. (6)
- Div. aŭtoroj. 1985. *Interkultura kompreniĝo kaj internacia kulturo*. Antverpeno: TEJO. (2)
- Duc Goninaz, Michel. 1974. *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko*. Liège: SUK. (5)
- Eco, Umberto. 1994. *La serĉado de la perfekta lingvo en Eŭropo*. Pisa: Edistudio. (1)
- Erasmus, H. k.a. 1992. *Komunikado en la Eŭropa Komunumo*. Antverpeno: Eŭropa Esperanto-Centro. (1, 5)
- Etnismo. Informilo pri etnaj problemoj*. Eschweiler: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj. (5, 6)
- Fettes, Mark. 1991. Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de eŭropa Babelo. *Esperanto-Dokumentoj* 27E. (1, 6)
- Fettes, Mark & Suzanne Bolduc (red.). 1998. *Al lingva demokratio*. Rotterdam: UEA. (1, 5, 6)
- Fishman, Joshua. 1982. Whorfianism of the Third Kind: Ethnolinguistic Diversity as a Worldwide Societal Asset. *Language in Society* 11: 1-14. (6)
- Frank, Helmar & Lobin, Günther. 1998. *Lingvo-orientiga instruado*. Nitra/München: Akademia Libroservo. (3)
- Illich, Ivan. 1981. Taught Mother Language and Vernacular Tongue. En D. P. Pattanayak (red.), *Multilingualism and Mother-Tongue Education*. Delhi: Oxford University Press, 1-39. (6)
- Internacia Pedagogia Revuo*. Hago: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. (2, 3)
- Korĵenkov, Aleksander. 1998. Esperanto post la jaro 2000. *Diskutkajeroj* 1. Rotterdam: UEA.
- Language Problems & Language Planning*. Amsterdam: John Benjamins / CED. (4, 5, 6)
- Lapenna, Ivo. 1966. *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*. Rotterdam. (1, 5)
- Levin, Leah. 1998. *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*. Rotterdam: UEA. (1)
- Lins, Ulrich. 1990. *La danĝera lingvo*. Moskvo: Progreso.
- Matthias, Ulrich. 1991. *Esperanto - das interkulturelle Erlebnis*. Edingen - Neckarhausen. (2)
- Moritz, Uwe Joachim. 1997. *Eŭropo parolas 100-lange*. Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut. (5)
- van Oostendorp, Marc (red.). 1998. *La projekto 'NEIGHBOUR'*. Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto, Universitato de Amsterdamo. (3)
- Piron, Claude. 1994. *Le défi des langues: Du gâchis au bon sens*. Paris: L'Harmattan. (4, 5, 6)
- Pool, Jonathan. 1987. Thinking about Linguistic Discrimination. *Language Problems & Language Planning* 11/1: 3-21. (6)
- Rašić, Nikola. 1994. *La Rondo Familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio. (4)
- Robins, Robert H. & Eugenius M. Uhlenbeck. 1991. *Endangered Languages*. Oxford/New York: Berg. (5, 6)
- Sachs, Wolfgang (red.). 1992. *The Development Dictionary: A Guide to Knowledge as Power*. London: Zed. (6)
- Selten, Reinhard (red.). 1997. *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado*. Roma: ERA. (1, 5)
- Skutnabb-Kangas, Tove & Robert Phillipson (red.). 1994. *Linguistic Human Rights*. Berlin: Mouton de Gruyter. (6)
- Symoens, Edward. 1992. Al nova internacia lingvopolitiko: la propedeŭtika valoro de Esperanto. *Esperanto-Dokumentoj* 28-29E. (3)
- Synak, B. & T. Wicherkiewicz (ed.). 1997. *Language Minorities and Minority Languages in the Changing Europe*. Gdańsk. Wydawnictwo Uniwersytetu Gdańskiego. (5, 6)
- Wurm, Stephen A. (Ed.). 1996. *Atlas of the World's Languages in Danger of Disappearing*. Paris/Canberra: UNESCO Publishing/Pacific Linguistics. (5, 6)
- Zamenhof, L.L. 1994. *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*. Jekaterinburgo: Ruslanda Esperantisto. (1, 5)
- Zamenhof, L.L. 1995. *Kongresaj paroladoj*. Jekaterinburgo: Ruslanda Esperantisto. (1, 5, 7)

Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, *direktas* ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo, *deklaras* nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj *invitas* ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio. Komunikado kiu tutvive privilegiu iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lernejoj kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lernejoj kiu studas Esperanton, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco. Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentas obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco. La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo — projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.